



ESPERANTO EN MARCHÉ

28 SEP – 1 OKT 2023
BENELUKSA KONGRESO

ni faris

VOJAĜO AL BUDAPEŝTO PER EO
UN RECORD MONDIAL BATTU

ni faras

KUNVENOJ DE LA LOKAJ GRUPOJ

ni faros

PEKO EN TILFF
POSTKONGRESO DE IFEF

Revue trimestrielle belge

PRINTEMPS 2023 - N°1

CONSTRUISONS LA PAIX GRÂCE À L'ESPÉRANTO
Ni KONSTRUU PACON DANK'AL ESPERANTO

Informations Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



FÉDÉRATION
WALLONIE-BRUXELLES

La kovrilbildo kreita de Robin Guinin. Vidu <https://www.facebook.com/LE.ROBINOSCOPE>

Devenir membre / Membriĝi

MEM (membre > 25 ans + revue) 25 €

JUN (membre < 25 ans + revue) 12 €

FAM (cohabitant pas de revue) 5 €

REV (abonnement revue seule) 12 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie

BE33 5230 8132 1946 avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

www.esperanto-wallonie.be

E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Kristin TYTGAT: 03 322 80 70 kristin.tytgat@skynet.be
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Contenu / **Enhavo**

Vojaĝo al Budapeŝto - 4
Pratiquons l'espéranto ! - 6
Un record mondial battu - 7
Groupe EO à la ULB - 8
Beneluksa Kongreso - 9
EO en norda Francio - 10
Nepre ĉeestindaj eventoj - 11
La tri romanoj de Anna
Löwenstein - 12
Lokaj grupoj en Valonio - 14
Etoso en Benino - 15
Pipro kaj Karoĉjo - 17
Lingva ludo - 18

Colofon / **Kolofono**

Ce magazine est édité
par l'asbl Espéranto
Wallonie - Rue de la
Terre Franche, 33 -
5310 Longchamps.
Rédacteur en chef :
Jean Annet
Rédaction et mise en
page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun
Communications à Strée



Éditorial **Antaŭparolo**

Saluton al ĉiuj

Cette année encore, nous avons la chance d'avoir plusieurs activités importantes : celles qui sont complètes et auxquelles vous ne pouvez plus vous inscrire, comme le Congrès IFEF à Anvers et le post-congrès organisé par le groupe de Charleroi, mais évidemment d'autres qui restent ouvertes : l'inauguration officielle du Congrès IFF à Anvers le 7 mai, PEKO à Tilff du 17 au 21 mai, notre Vespa Pikniko qui est prévu début septembre et surtout le Beneluksa Kongreso qui aura lieu à Bouillon du 28 septembre au 1er octobre.

Vous découvrirez également d'autres possibilités en Belgique et ailleurs dans ce numéro. Je vous invite aussi à contacter régulièrement le site 'Eventa Servo' qui tient à jour toutes les activités.

Par ailleurs, je voudrais remercier ici tous les membres qui ont renouvelé leur cotisation. Cela nous permet de continuer à vous offrir toujours plus de nouvelles opportunités pour l'approfondissement de la langue.

Jean ANNET

Séjour à Budapest

De la 27-a de februaro ĝis la 3-a de marto, mia edzino Isabelle kaj mi private vizitis Budapeŝton. Preparante nian vojaĝon, ni rimarkis, ke estos pli facile esti gvidataj surloke de denaskulo kaj ni kontaktiĝis kun esperantisto de Budapeŝto.

Tuj Anna Besenyei respondis al ni. Ŝi estras la esperantan klubon de Budapeŝto kaj ŝi liberigis dum kelkaj tagoj por gvidi nin tra la urbo. Fakte estis tre agrable esti akompanata de la flughaveno al nia hotelo sen devi fari demandojn por trovi nian itineron en urbo, kiun ni ne konas kaj kie surloke ni tute ne komprenas la lingvon.

La sekvan matenon ŝi irprenis nin en la hotelo dirante, ke ŝi faris specialan programon por ni. Ni sciis kion ni volis vidi, sed ŝi nepre volis, ke ni vidu la Zamenhof-parkon. Estas sufiĉe normala parko kun stelo kaj statuo de Zamenhof.

Kompreneble, ĉi tiu parko estas en neniuj gvidlibroj. Sen ŝi ni evidente neniam estus vizitintaj tiun parkon kiu estis establita por la UK de Budapeŝto en 1966. Ŝi fiere memorigis al ni, ke tiu ĉi Budapeŝta kongreso (estis, fakte 3) kunigis pli ol 4000 homojn, igante ĝin la plej multnombre ĉeestita kongreso post tiu de Varsovio.



Vojaĝo al Budapeŝto per Esperanto

Krom tiu ĉi specialaĵo, ni vizitis la karakterizajn vidindaĵojn de la urbo, sed – denove – sen devi esti okupita pri nia itinero kaj, kompreneble, kun privata ĉiĉerono.

Budapeŝto estas tre agrabla urbo kaj tre bela. Ni multe promenis en agrablaj parkoj, ni vizitis la kastelon kaj la termo-banojn, ni eniris la operon por vidi la superbajn renovigojn kaj ankaŭ fari iom da butikumado en la granda bazaro.


Vespere, sur la Danubo ni prenis boaton por vidi la

konstruaĵojn lumigitajn.

Sed ni renkontis ankaŭ esperantistojn. La monata kunveno de la klubo okazis dum nia restado. Anna demandis min, ĉu mi povas prelegi. Kaj mi prelegis efektive pri mia ŝatata temo: la Interna Ideo de la lingvo.

Tiu ĉi vojaĝo estis la okazo de tre interesaj renkontoj kaj ni povis konstati la grandan avantaĝon esti esperantisto.

Jean ANNET



Pratiquons l'espéranto !

Altnivela parolado akcelas nian lingvon

La lingva kaj socia situacio en Eŭropo kaj la mondo dum la epoko de la kreigo de Esperanto estis alia ol hodiaŭ: tiam la ideo pri internacia planlingvo kiel helplingvo korespondis al la bezonoj de homa komunikado. Tiam lingvo estis bezonata por priskribi multajn aferojn kiuj hodiaŭ estas priskribitaj per bildoj, simboloj, desegnoj. Kaj tio ĝuste tuŝas la aplikon de la lingvo kiel helplingvo. Se oni povas vidi bildon de iu objekto en ĉiuj detaloj, se tia bildo estas disponebla post sekundoj en ajna mondoparto, tiam restas por la lingvo ne plu multe por klarigi la kuntekston. Por tio ne necesas tre alta nivelo de regado de lingvo kaj tial la demando pri facileco aŭ malfacileco de certa lingvo por tio apenaŭ havas signifon, precipe se oni tiucele komparas du lingvojn kiuj estas sufiĉe similaj unu al la alia, nome la angla kaj Esperanto.

La avantaĝo de Esperanto kompare al la angla ne troviĝas en la baza aplikado de la lingvo, sed en altnivela aplikado, nome en altnivela parolado de la lingvo. Kio ne eblas ĉe la angla lingvo, nome unueca laŭfonetika parolado, tio ja eblas en Esperanto: Por Esperanto ekzistas normoj por la prononcado, dum por la angla tio mankas. Tio ja ne signifas ke ĉiu kiu lernas Esperanton kapablas plene paroli laŭ tiuj normoj, sed E-parolanto havas almenaŭ klaran orientiĝon pri bona kaj bela parolado de Esperanto. Kaj ja estas grava diferenco al

la angla: dum ĉe la angla oni vane postkuras la lingvouzon por trovi por si mem la plej taŭgan, en la kazo de Esperanto aŭskultado de bona parolado kaj parolekzercoj kondukas al pli bona parolkapablo kaj sekve al pli granda memkonscio kaj kuraĝo pri la parolado de la lingvo. En Esperanto oni povas akiri suverenecon, en la angla tio nur eblas por denaskaj parolantoj de la lingvo. Por antaŭenigi Esperanton, por vivteni ĝin, necesas praktiki ĝin. La minimumo kiun ĉiu facile povas fari estas laŭtleĝado. Tio plej bone funkcias se aliaj aŭskultas tion. Bona loko por tio estas la E-kluboj. La laŭtleĝado de teksto povus esti fiksa elemento de ĉiu klubkunveno. Kaj trovi tekston tiucele estas tre facile. La Esperanta Retradio ofertas centojn da tekstoj kiuj estas legeblaj kaj aŭdeblaj. Dum klubkunveno oni povas ne nur aŭskulti kaj laŭtleĝi ilin, sed oni povas ankaŭ preni ilin kiel bazon por diskutoj. Klubkunveno tiel povas esti vigla kaj interesa. Kaj tiaj klubkunvenoj altiros homojn kun intereso pri la lingvo.

La lingvo povas nur kreski per altnivela aplikado. Fejsbuk-nivela aplikado aliflanke altiras pli da homoj, sed tio apenaŭ akcelas la lingvon. Ni devas konscii ke agado kiu celas altan kvaliton de lingvouzo ne altiras homamasojn, sed ke nia ŝanco estas la konvinka forto de kvalito.

<https://mallonge.net/retradio23>

Un record mondial battu

Rakonto laŭtlecita en 65 lingvoj

Le record mondial Guinness de lecture à haute voix multilingue a été battu le 26 février à la bibliothèque Bib Sophia à Schaerbeek. Des élèves et parents des écoles locales ont lu un extrait du livre "Meneer René", de l'auteur pour enfant Léo Timmers, dans 65 langues différentes – y compris l'espéranto –, battant ainsi le précédent record mondial établi à 50 langues par le Qatar. L'idée de cette tentative a été initiée par la bibliothèque, les écoles

de Schaerbeek et l'ASBL Foyer. L'une des phrases du livre a été lue à voix haute dans les 65 langues avec une pause de dix secondes maximum entre chacune. Un jury d'experts composé de professeurs et de collaborateurs des universités de Gand, d'Anvers, de Bruxelles et de Louvain-la-Neuve ainsi que de traducteurs professionnels des institutions européennes a été chargé de juger si les langues étaient employées correctement. *Fonto: <https://7sur7.be>*



Les Alumni deviennent les IAmA [i-a-ma]

Le réseau des anciens et amis des Scouts Baden-Powell de Belgique change de look mais pas que... Nouveau logo, nouveau nom: **IAmA signifie ancien en espéranto.**

<https://www.iama.be>

Groupe d'espérantistes à l'ULB

Nova universitata grupo en Bruselo

La 15-an de februaro 2023 12 personoj el ULB (Brusela Libera Universitato, franclingva), el VUB (Brusela Libera Universitato, nederlandlingva) kaj el EBG (Esperantista Brusela Grupo). Tiuj kunvenis en VUB je invito de Kristin Tytgat (VUB). La gvidanto de la renkontiĝo estis Adam Brooking, iama VUB-studento kaj nuna instruisto de Esperanto en EBG. La duono de la grupo konsistis el junaj studentoj. Ili konatiĝis dum la lasta IJK en Nederlando. Inter ili plej aktivas Atiljo, juna inĝeniera studento de ULB. La komuna lingvo inter la ĉeestantoj estis Esperanto. Dum la kunveno okazis la fonda de universitata Esperanto-grupo de la du universitatoj. Ĝia nomo estos KLUBO, akronimo de Klubo de la Libera Universitato de Bruselo. LUBO estas vorto por ULB kaj VUB.

Celo de Klubo:

1. Disvastigi la lingvon en ambaŭ universitatoj: organizi lingvokursojn, prelegojn, enkondukojn kaj babiltablojn.
2. Agadi ekster la universitato: organizi fulmkursojn en bazaj kaj mezgradaj lernejoj.
3. Sentemigi homojn al lingvokulturaj problemoj kaj lingvaj



rajtoj. Interesa temo en la multlingva urbo Bruselo kaj studobjekto en VUB.

4. Organizi kulturajn interŝanĝojn pere de Esperanto: eble en Erasmus+projekto.
5. Organizi studentajn kantvesperojn, renkontiĝojn pri folklorajoj, dialektoj ktp.

Kristin TYTGAT

Congrès à Bouillon

Beneluksa Kongreso 2023

A vos agendas : un rendez-vous d'automne incontournable ! Le prochain Beneluksa Kongreso se déroulera à Bouillon du 28 septembre au 1er octobre. Nous avons voulu vous faire découvrir le tout nouveau parc naturel de la Semois et profiter de cette magnifique nature ardennaise.

Dès à présent, le programme s'annonce dense et très varié : excursions, visites touristiques, découvertes historiques, ateliers de chant, conférences, concert, cours, tables de conversation, jeux, ..., tout cela dans notre traditionnelle ambiance sympathique et multilinguistique.


Nous logerons à l'auberge de jeunesse ce qui nous limitera à une septantaine de participants. N'hésitez donc pas à réserver dès maintenant, soit, en vous inscrivant directement sur le site <https://benelukso.eu/kongreso> ou si les moyens informatiques ne vous inspirent guère, en contactant un des organisateurs : Jean, Jean-Pol, Yves ou Valère.

Un acompte de 50 € à virer sur le compte d'Espéranto-

Wallonie (BE33 5230 8132 1946) vous sera demandé pour confirmer votre réservation.

Les prix d'une participation vont de 75 € pour un jour (2 repas inclus) à 289 € (4 jours, 3 nuitées en chambres communes, 10 repas). Possibilité de chambres individuelles moyennant suppléments. Possibilité de réductions pour les contributeurs. Les frais d'inscriptions seront majorés de 10 % après le 20 août !

Jean-Pol SPARENBERG



L'espéranto au nord de la France

Aktivas esperantistoj ankaŭ en norda Francio



La fédération régionale Espéranto Hauts-de-France se dote d'un nouveau site internet, non seulement pour elle mais aussi pour ses clubs locaux adhérents. Ce site est accessible à l'adresse suivante : <https://nordafrancio.fr>

Le Norda Kuriero est le bulletin d'information électronique de la fédération régionale Espéranto Hauts-de-France, fondé en 2016 et réalisé par l'équipe de rédaction composée de Xavier DEWIDHEM et Katja BOEN. Les numéros du Norda Kuriero sont consultables sur Google Drive. Les avez-vous déjà consultés ?

Premier « bunta Esperanto tago » à Thionville le 10 décembre 2022

Les groupes d'espéranto de Luxembourg, Thionville et Nancy ont décidé d'organiser une ou deux fois par trimestre des journées d'espéranto à programme varié : le matin un cours pour les débutants et un cours de perfectionnement pour les anciens élèves; l'après midi, diverses présentations ou informations en espéranto sur des sujets variés, le tout entrecoupé d'un repas en commun. Cette première journée a été préparée par le groupe de Thionville, qui dispose d'une salle bien équipée dans la « Maison Quesnau », lieu bien situé, hébergeant de nombreuses associations et disposant d'un parc de stationnement gratuit. 13 participants sont venus de Thionville, de Nancy, du Luxembourg et même d'Allemagne. Faute de débutants, il n'y a eu le matin que le « kurso por progresantoj » sur la base du manuel « l'enseignement par la bande dessinée » de Michel Dechy.

En savoir plus? Rendez-vous sur <https://esperanto-nancy.fr>

Des rencontres à ne pas rater

Nepre indos ĉeesti ĉi tiujn eventojn

Ĉu vi partoprenos en la IFEF-kongreso en Antverpeno? (vidu EEM 2022/4). Sciu, ke la Solena Inaŭguro je dimanĉo, la 7a de majo, inter 10 kaj 12h, estos senpaga evento: ĉiu esperantisto estas varme invitita. **La Solena Inaŭguro okazos en Campus National de la Altlernejo Thomas More, Kronenburgstraat 62-68, 2000 Antwerpen.** Mapeto kun ligilo al Google Maps aperas en Eventa Servo. Jen mallonga kaj facile tajpebla ligilo: <https://mallonge.net/inauguro23>. Se vi ne disponas pri Google Maps, jen kiel vi plej facile atingas la inaŭguran saloonon:

- Prenu pre-metrolinion 15 (direkte al "P+R Boechout Regatta"), eltramiĝu en haltejo "Antwerpen Groenplaats".
- De tie aŭ piediru (proks. 1 km) tra la Nationalestraat ĝis Kronenburgstraat 62 (flankstrato de Nationalestraat) aŭ prenu tramon 4 (direkte al Berchem station) kaj eltramiĝu en haltejo Tropisch Instituut.

La inaŭgura salono troviĝas en la proksimeco de la Groenplaats (Junulargastejo Pulcinella, Bogaardeplein 1, 2000 Antwerpen). Atenton: la dimanĉvespera programo estas pagenda, t.e. ĉu pere de la ĝenerala kongresa kotizo, ĉu pere de taga kotizo por dimanĉo.



Tago de la Flandraj Ardenoj: 16 aprilo 2023

La Flandraj Ardenoj estas la kromnomo de regiono inter Oudenaarde, Ronse kaj Zottegem. Estas elstare bela regiono en Flandrio. Ĉiujare lokaj naturasocioj organizas "Vlaamse Ardennendag" [Tago de la Flandraj Ardenoj] por konatigi homojn kun la belaj Flandraj Ardenoj. Lokaj ĉiĉeronoj givdos grupojn de personojn en diversaj naturrezervejoj de la regiono. Esperantogrupo "La Konkordo" el Kortrijk jam pli ol 20 jarojn kondukas esperantistojn tien. Antaŭtagmeze ni promenos en la naturo. Posttagmeze ni vizitos la novan tekstilmuzeon MUST en Ronse, kiu iam estis grava tekstilurbo. Trovu pli da detaloj, aliĝilo kaj kontaktadreso en <https://eventaservo.org/e/tago23>. Ĉu vi ankaŭ venos?

Oeuvres originales en espéranto

La tri romanoj de Anna Löwenstein

Mi ŝatas legi. Eĉ en Esperanto. Pasintjare mi finis la trian romanon de Anna Löwenstein. Mi komencis kompreneble per la unua. La pli fama. La pli konata: «la Ŝtona Urbo».

Se vi ankoraŭ ne legis bonan romanon en esperanto, mi rekomendas ĝin. Oni tuj estas kaptita per la historio de tiu juna britulino kiu estas malliberigita de la romaj invadoj. Ŝi loĝis en lignaj kabanoj en Britujo kaj nun ŝi malkovras ŝtonan urbon: Romo.

La stilo de la aŭtoro estas tre bela, agrabla kaj – mi diru – tre esperantista. Sed ne nur la stilo plaĉas, kaj ankaŭ kaj ĉefe kaj precipe la enhavo. Ni estas mergitaj en la antikva Romo, siaj kutimoj, siaj komercoj, siaj festoj, kaj por la alta klaso, siaj komplotoj.

Ĉu Nerono bruligis partion de Romo por plibeligi la urbon? Kaj kiu estis tiu nova sekto kiu pligrandiĝis en Roma tiutempe? La Unuaj Kristanoj etendiĝis sur ĉiuj tavoloj de la Roma societo kaj ‘nia’ eks-brito aniĝis al la nova movado.

Fakte, leginte la unuan verkon oni iomete restas malsatintaj pri la romianoj de la unuaj jarcentoj. Kiu estis tiu Nerono

historie konata por la bruligado de Romo kaj la mortigado de miloj da kristanoj?

La dua libro ‘Morto de Artisto’ estas la rakonto de lia vivo.

Ĉi tie, oni restas preskaŭ nur ĉe la imperiestra kortumo. Nerono imperiestriĝis je sia 17a jaraĝo. Multobligas la festoj, multobligas la komplotoj, multobligas la mortigoj kaj murdoj. Tamen la rakonto ne estas peza. Estas la vivo de Nerono kaj de la Romianoj de la unuaj jarcentoj. Kiel en la unua libro, oni vidas la tiutempan vivon kaj la aŭtoro elstaras en la rakonto de miloj da detaloj pri la manĝaĵoj, la vestoj, la kutimoj de la malaltuloj de Romo kaj de la Kortumo. Kaj ankaŭ pri la artoj. Nerono ricevis bonan edukadon kaj ankaŭ artan edukadon. Li pensis, ke li estas bona artisto. Li multobligis festojn kaj ludojn en la roma cirko. Li ludis kaj kantis sin mem, pensante esti la plej bona. Sed li malamis, ke homoj dubis pri lia arto. Sed ankaŭ pri lia maniero regi la imperion, lia maniero elspezi monon. Inter ĉi tiuj homoj estis lia patrino: Agripina.

Ĉu Nerono mortigis sian patrinon? Por bone scii tiun aferon, oni devas legi la trian romanon ‘La Memoraĵoj de

Julia Agripina’.

Ĉi tiu tria verko de Anna Löwenstein estis vera defio. Ŝi bezonis 12 jarojn por verki ĝin. Ĉiuj skribaĵoj de Agripina estis detruitaj. La aŭtoro rekonstruis la vivon kaj la pensojn de Agripina kaj verkis la romanon je la unua persono. Estas la sama epoko, la samaj kutimoj, sed la leganto eniris pli intime en la pensmanieron de la Romianoj, eĉ pli de ina romano.

Agripina estis la nepino de granda roma imperiestro. Se ŝi estis viro, ŝi imperiestriĝis. Ŝi havis la inteligentecon, la klerecon, la saĝon, la sagacecon por esti imperiestro. Ŝi estus estinta granda imperiestro, kiel sia praavo.

Sed la Romianoj ne ŝatis tre klerajn virinojn. Ili malfidas ilin. Dum sia tuta vivo, Agripina devis zigzagi inter sia volo servi kaj regi sian popolon, kaj resti dommastrino.

Kiam sia filo, Nerono, farigis imperiestro, ŝi volis ankaŭ konsili lin.



Sed inter konsili kaj kontraŭdiri, la paŝo estas malgranda.

Ŝi preskaŭ pereis en ŝiprompiĝo kaj estis mortigita kelkajn tagojn poste.

Ĉu estis Nerono ? La aŭtoro lasis la leganton diveni.

Kiam mi demandis ŝin ĉu estis la vera historio de Agripina, ŝi respondis, ke multaj romianaj skribaĵoj ekzistis pri Agripina, eĉ se iuj kontraŭdiras unu la alian. Kaj, kompreneble, ŝi devis konstrui ŝian vivon el detaloj, kiujn ŝi legis en literaturo.

Jean ANNET



Les groupes espéranto en Wallonie

Kunvenoj de lokaj grupoj en Valonio

Charleroi

Kunvenejo: Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Ni kunvenas ĉiun mardon de la 9.00 h ĝis la 12.00 h.

Liège

La 25-an de februaro ĉe Toutes Directions, Pierre parolis pri sia laborvojaĝo en Benino kaj Richard prezentis tekston el la Esperanta Retradio « La katoj kaj homoj ». La venonta paroliga rondo en Liège estas planita je la 29-a de aprilo.

PEKO okazos en Tilff de la 18-a ĝis la 21-a de majo. La lieĝanoj proponos kunkantadon kaj/aŭ promenadon kun demandoj pri la regiono. Ili ankaŭ informiĝos pri ebleco kajaki sur la rivero Ourthe.

Ni invitas vin viziti Eben Emael la 10-an de junio. Ni rendevuos en la stacidomo Liège-Guillemins je la 10:15 (Pierre, Richard kaj Erik povas veturi personoj) aŭ en Eben Ezer je la 11a horo. Post ĉirkaŭado de la turo kaj tagmanĝo en “le moulin du Broukay”, ni vizitos la pajlan muzeon de Eben Emael kun Nicole kaj Freddy. Ni finos je la 16:15 por reveni al Liège Guillemains je la 17a horo. Necesas rezervi por la tagmanĝo kaj la kunveturado.

Eric NEMES kaj Eliane PIRONNET

Verviers et La Calamine

La 17-an de marto okazis vesperkunveno de Senlime, en Kelmis, iama Amiĝejo! (Moresnet). Enkonduke oni montris filmeton pri Irlando kaj pri St. Patrick, ambaŭ en Esperanto, unu el ili eĉ kun la voĉoj de pluraj esperantistoj, kiel nia veforpasinta amiko Karlo Norga. Poste ni aŭskultis, unu post la alia, irlandajn kantojn kaj ilin tuj poste kunkantis en Esperanto, karaokee.

Ni aŭskultis pri la historio de la St Patrick la eblaj kialoj de la malapero de la celta civilizacio ĝia anstataŭo per la kristana. Ni kantis en la angla kaj en Esperanto. Estis tre agraba kaj bone organizita vespero. Partoprenis 8 esperantistoj: el Verviers, Didier, Jean-Marie kaj Raymond, el Kelmis kaj Vaals Doorle kaj Michèle, el Ergenrath Klaus, El Seraing Erik kaj el Esperantujo nia krokodilo. DANKON al Senlime.

Raporto kun fotoj: <https://mallonge.net/patrick>

Erik NEMES

Plus d'infos sur les activités d'espérantistes en Belgique se trouve sur notre site <https://esperanto-wallonie.be> > Calendrier des événements.

Mon voyage au Bénin

Etoso en Benino

Pro profesiaj kialoj, mi havis la oportunon vojaĝi al Benino du fojojn: du semajnojn en oktobro 2021 kaj ok tagojn en februaro 2023. Tuj post kiam mi alvenis tie, mi sentis la altajn temperaturojn (37°C tage kaj 25°C nokte – la plej freŝa temperaturo) kaj la humidecon. Tagmeze, la suno estas al zenito, do la ombroj estas tre etaj. La tutan jaron la vegetaĵoj estas verdaj kun folioj aŭ floroj. Benino troviĝas en la golfo Gvineo (okcidenta Afriko), en la norda hemisfero, sed apud la ekvatoro. Najbaraj landoj estas Niĝerio, Togo, Burkino kaj Niĝero. La lando ŝajnas kiel granda lago; la ĉefa rivero Uemo fluas tra la lando (suden al la marbordo).

Mi loĝis en Kotonuo kaj ankaŭ en Porto-Novo. Tiuj du urboj troviĝas en la suda parto de la lando. Kotonuo estas la ekonomia ĉefurbo precipe pro ĝia granda haveno. Porto-Novo esta la administra ĉefurbo apud Niĝerio, la lando en kiu loĝas pli ol 210 milionojn da loĝantoj. Mi ankaŭ trapasis la urbojn Uidao kaj Granda-Popo ĉe la limo inter Benino kaj Togolando, ambaŭ ĉe la marbordo.

Oni konstruas multajn novajn konstruaĵojn precipe en Kotonuo kaj ankaŭ grandajn vojojn. Do, la malnovaj etaj aĉaj konstruaĵoj estas detruitaj. Kotonuo volas kreskigi la

havenon, sed ankaŭ la turismon ĉe la vojo de fiŝkaptistoj inter Kotonuo kaj Uidao. Post la malkonstruo de domaĉoj sur la blanka strando, oni plantas kokosarbojn. La mediteranea klubo dezirus starigi grandan turisman konstruaĵon en Uidao, kiu estis la urbo de kie la sklavoj enboatis al Haitio aŭ Brazilo. Mi timis la gravan veturo-trafikon en Kotonuo kaj ankaŭ en Porto-Novo. Ĉie estas motorbicikloj por transporti ĉiujn. Ververe! Do, oni transportas ofte la ŝoforon kaj plie kvar ulojn sed ankaŭ vivantajn bestojn (kokinojn kun la kapo al la tero, ŝafoj kun ligitaj piedoj) aŭ fridujon, trinkaĵojn, ktp, ...).



Malnovaj veturiloj provas moviĝi inter la motocikloj kaj la ŝoforoj ofte hupas. Tiel, la aera kvalito ne estas tre bona en tiuj urboj kaj la ĉielo estas malofte blua. Estas multaj grizaj nuboj aŭ sableroj, polvoj en la aero dum la Harmatano (afrika tera vento blovas el Saharo). Laŭlonge ĉefaj vojoj, uloj vendas diversajn varojn kiel kontrabandan benzinon el Niĝerio (350 CFA/litro kontraŭ 600 CFA en oficialaj vendejoj), legomojn (ignamo-tuberojn, karotojn, batato-tuberojn, ktp, ...), fruktojn (kokosojn, ananasojn, mangojn, papajojn, oranĝojn, ...), fiŝojn aŭ viandojn. Oni kudras vestaĵojn per malnovaj nigrajn stebilojn "Singer". Krom, inter la meznokto kaj la kvina horo, estas ĉiam granda bruanta bazono!

Multaj plastaj sakoj aŭ plastaj folioj staras sur la stratoj. Ĉie, ĉiuj ĵetas la rubaĵojn. Malofte, oni bruligas tiujn rubaĵojn. Tiu estos ŝokas min! Apud ĉefaj vojoj ekzistas ankaŭ multe da etaj vojoj en ruĝaj teroj (laterito) kiuj estas tre glitaj kiamforte pluvas (dum la pluvsezono).

Nuntempe, la ŝtato provas realigi terenregistraron de konstruaĵoj por imposti la posedantojn. Do, estas konstruonta ŝtato. Oni pli-komprenigas ke la organizado de niaj okcidentaj landoj estas la rezulto de komuna volo el la popolo kaj ke nenio estas neniam obteni daŭre!

Mi surpriziĝis pri la juneco de la popolo. Multaj infanoj lernas, en diversaj lernejoj, la francan (la oficiala lingvo de la lando) kaj ankaŭ la anglan. Ofte, estas 4, 5, 6 aŭ pli da infanoj en la familioj! Ŝajnas al mi, ke ekzistas grandaj ekonomiaj

diferencoj inter civitanoj. Tiel, apud mia hotelo, staras etaj domaĉoj kie virinoj kuiras la manĝaĵon per eta lignokarbo forno ĉar la prezo de la gaso estas tro alta.

La monata bazo salajro estas proksimume 60.000 CFA aŭ 90 eŭroj. Monate, la pli alta salajro estas 300.000 CFA aŭ 450 eŭroj. Oni kuras ĉiam per tradiciaj metodoj ĉar se vi devus iri al la malsanulejo vi devus pagi antaŭe ricevi zorgojn!

Etas pluraj religioj en Benino. Voduo (animisma religio) sed ankaŭ krista (sude) kaj islama (norde kaj oriente) religioj. Ofte, homoj praktikas plurajn religiojn. Estas pluraj administraj aŭtoritaj. La urbestro en la komuno, la prefekto en la departemento kaj la prezidento en la ŝtato. Estas ankaŭ justaj aŭtoritaj. Sed estas ankoraŭ tradiciaj reĝoj kies funkcio gravas. La loko de la virinoj en la komunumo evoluas, sed estas ankoraŭ defio. La franca estas oficiala lingvo, sed estas parolata diversaj indiĝenaj lingvoj kiel la fonua lingvo aŭ la "peula" lingvo ktp, ... Oni parolas tiujn lingvojn trans la naciaj limoj kiel en Belgio ekzemple en la triland regiono.

La japana kaj la ĉina registaroj ofertas al beninanoj bursojn por studi en Japanio aŭ Ĉino. Tiel la studentoj lernas la japanan aŭ la ĉinan. Poste, tiuj personoj kapablas paroli kun japanoj aŭ ĉinoj en Benino. Do, lingvoj estas ekonomiaj iloj!

Bedaŭrinde, mi ne sukcesis paroli kun beninaj esperantistoj. Eble dum venonta vojaĝo!

Pierre SIMON

Une BD libre et multilingue en ligne

Pipro kaj Karoĉjo

Pepper&Carrot est une série de bande dessinée en ligne libre créée par l'artiste français David Revoy. Cette série raconte l'histoire de la jeune sorcière Pepper et de son chat Carrot dans le monde magique d'Hereva. Pepper apprend la magie de Chaosah, la magie du chaos, avec ses marraines Cayenne, Thym et Cumin. D'autres sorcières comme Safran, Coriandre, Camomille et Schichimi apprennent des magies qui ont chacune leurs spécificités.

Les épisodes sont réalisés sous environnement GNU/Linux avec des logiciels libre : Krita3 et Inkscape.

Les aventures de Pepper&Carrot sont bien souvent trépidantes et pleines d'humour, et contiennent parfois un aspect philosophique ainsi que des références à la pop culture et à la technologie moderne.

Selon les épisodes, le scénario est écrit en français ou en anglais. Au fur et à mesure de l'avancement de l'épisode, celui-ci est partagé avec la communauté qui peut faire des retours sur différents thèmes: scénario, dialogues, graphisme... Une fois l'épisode presque finalisé, les dialogues sont gelés et la communauté peut commencer à traduire l'épisode dans la langue

de son choix. Aujourd'hui une cinquantaine de langues différentes disposent d'au moins un épisode. Certaines sont des langues courantes, d'autres des langues mortes et même des dialectes régionaux ou des langues construites comme l'espéranto.

<https://www.peppercarrot.com/eo>

Source + en savoir plus : Wikipédia
<https://fr.wikipedia.org/wiki/Pepper%26Carrot>



Jeu de mots

Lingva ludo: sentoj kaj emocioj

En tiu ĉi krado estas kaŝitaj 26 sentoj aŭ emocioj. Ĉu vi povas trovi ĉiujn?

E	Ŝ	M	O	O	T	N	E	T	N	O	K	L	A	M
O	K	Ĉ	A	M	Ŭ	A	D	M	I	R	O	R	I	M
M	D	S	E	L	E	C	N	M	O	F	M	S	B	R
Z	A	R	C	T	Ĝ	K	E	Ĝ	I	I	P	K	S	I
K	M	L	E	I	F	O	I	F	V	E	A	O	R	H
E	O	Z	A	P	T	R	J	M	K	R	T	O	O	V
S	R	N	T	M	T	I	A	O	A	O	O	C	I	A
H	U	I	F	S	I	L	Ĝ	O	U	F	O	E	L	R
E	M	R	U	U	E	K	R	O	O	M	D	T	O	M
O	N	R	P	S	Z	I	E	Ĝ	H	U	A	L	K	E
R	F	A	P	R	P	O	A	M	V	I	U	U	N	C
F	Ŝ	E	M	O	I	R	A	Ĉ	O	R	N	T	A	O
M	R	D	S	I	U	Z	P	G	E	T	E	S	L	E
O	Ŭ	S	S	K	Ĝ	G	O	E	N	V	I	O	E	R
M	A	L	P	A	C	O	L	O	V	I	C	S	M	V

Kaŝitaj vortoj

admira	miro
amikemo	perdo
ekscitiĝo	scivolo
enamiĝo	sopiro
enuado	stulteco
envio	surprizo
fiero	timo
frustiĝo	triumfo
kompato	varmeco
konfuzo	
kuraĝo	
malamikemo	
malespero	
malĝojo	
malkontento	
malpaco	
melankolio	

V.Esp-o dispose d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Glady.

Renseignements : cglady@arcadis.be

Rencontres et cours réguliers :

Charleroi - <https://esperanto.be/charleroi>

Centre Culturel, rue du Château 3 - 6032 Mont-sur-Marchienne. Pour y participer: Michèle Villers michele.villers@hotmail.com

Eghezée Jean Annet - jean.annet@gmail.com
0495 10 32 30

Huy Eliane Pironnet - epironnet@gmail.com
0494 230 234

Liège - <https://esperanto.be/liege>

Eric Nemes - eric.nemes@gmail.com
0494 230 234

Verviers - <https://esperanto.be/verviers>

Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be
087 33 02 92

Tables de conversation :

Liège

Chez « Toutes directions ». Infos : 04 262 20 64 -
<https://mallonge.net/td>

Louvain-la-Neuve

Catherine Royaux cat.royaux@netcourrier.com

Participons ensemble PEKO en Tilff 17-21 majo

De pluraj jaroj, PEKO estas LA kongreso en Belgio. Nepre venu kaj invitu viajn konatojn partopreni. Ĉi-foje ni festos la 10-jariĝon de la Verdaj Skoltoj! Ĉu ankaŭ vi aliĝos?
verdajskoltoj.net/peko



Autres personnes ressources

- Contact presse : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Glady 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

**Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !**

L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



à emporter !

L'espéranto, c'est dans la poche

découvrez une langue en une semaine



Recevez cette brochure gratuitement !

- via notre site : esperanto-wallonie.be
- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbes

6540-dépôt
Lobbes
P001014

